

LINGVO INTERNACIA

MONATA GAZETO POR LA LINGVO ESPERANTO.

Eldonata je la nomo de l' Klubo Esperantista en Upsala.

Kosto de abono por jaro: Skandinavaj kronoj 4,00 = germanaj markoj 4,50 = frankoj 5,75 = rubloj 2,00 = portugalaĵaj rejsoj 1000 = brazilaj rejsoj 2000 = aŭstro-hungaraj kronoj 5,50 = dolaroj 1,25 = ŝilingoj 4 1/2.

Pago por anoncoj: 15 oeroj = 15 pfenigoj = 20 centimoj = 8 kopekoj = 20 heleroj, por duonpaĝa petitlinio. — 10% rabato por duonjaraj, 25% rabato por tutjaraj anoncoj. Ĉe granda anoncado ankoraŭ pli da rabato laŭ reciproka konsento.

Adreso de l' redaktoro: PAUL NYLÉN, UPSALA, Sverige (Svedujo).

Adreso de l' administrado: Presejo de PAUL DE LENGYEL, SZEGZÁRD, Magyarország (Hungarujo).

Kun manuskriptoj kaj ĉio tuŝanta la tekston oni sin turnu al la redaktoro; pri abono, ekspedado, anoncoj kaj ĉiuj monaj aferoj oni devas turni sin al la presejo.

La nova jaro.

Ni deziras al ĉiuj amikoj de Esperanto feliĉon kaj ĝojon en la jaro 1900.

Niaj legantoj kune kun ni deziru, ke tiu ĉi jaro estu tre feliĉa por nia kara lingvo, — ke ĝi estu la pordo, tra kiu Esperanto eniru en la grandan domon de la homaro ne kiel gasto, sed kiel servanto ŝatinda kaj utiliga.

La *Lingvo Internacia* komencas nun la kvinan jaron de sia ekzistado.

Dum dek jaroj ekzistis jam Esperanta gazeto. La „Esperantisto“, kies daŭrigo estas la „Lingvo Internacia“, estis eldonata el Nurnbergo dum la jaroj 1890–1895. Oni povus diri, ke tiu tempo prezentis la infanecon de nia lingvo, kiu trairis tiam ankaŭ la infanajn malsanojn. Ilin ĝi elportis bone, kaj post la krizo restis sana kaj vivopova, kreskante kaj fortiĝante.

De l' fino de 1895 ĝis la komenco de 1900 la gazeto sub la nuna nomo

estis presata en Upsalo, — kiel scias niaj legantoj.

Montris sin, ke la gazeto ankoraŭ ne ricevis dum tiu ĉi tempo sufiĉe da vira firmeco en sia organizo, ke ĉe ĝi restis multe da junula manko de seriozeco en la karaktero kaj da nekapablo kalkuladi kun la nudaj faktoj de l' efektiveco anstataŭ siaj propraj revoj kaj neatingeblaj idealoj.

Nun estas nova epoko en la vivo de nia gazeto, ĉar ĝia hejmo estas de nun en Hungarujo. Ni esperu, ke la tempo jam estas plenumita, ke la junulo fariĝas viro; ni esperu, ke ĝi ne sole komprenos sian celon, la vastigadon de Esperanto eksteren kaj fortiĝo internen, sed ankaŭ povos trovi la ĝustajn kaj plej konvenajn rimedojn por atingi tiun ĉi celon, kaj ke ĝi povos sekvi la maksimumojn por sia agado kun akurateco, forto kaj saĝo.

La ĉefa kondiĉo, ne sole por la ekzisto de la gazeto, sed ankaŭ por ke ĝi povu eliradi akurate kaj regule, estas tio,

ke al ĝia kaso ne manku la necesa mono. Sen la mono ĝia vivo malfortiĝas. Ju pli multe da abonantoj havos la gazeto, des pli granda estos ĝia kaso kaj pro tio ĝia povo plenumi ĉiujn postulojn de la flanko de l'abonantoj. Tial — penadu ĉiam varbi novajn abonantojn! Se restos ĉe la fino de l'jaro ia superflua sumo, ĝi estos ŝparata kiel fondkapitalo por sekurigi la ekzistadon de l'gazeto en la venonta jaro.

La redakcio — same kiom la legantoj — deziras, ke la enhavo de l'gazeto estu kiel eble plej bona, leginda kaj interesa.

Same kiel ĝis nun „Lingvo Internacia“ enhavos pli-malpli longajn artikolojn pri la pli gravaj demandoj koncerne la aferon Esperantan. La *kroniko* de ĉiu numero donos notojn pri la agado de la societoj, kluboj aŭ apartaj personoj, pri kursoj, nova literaturo esperantista kaj gazetoj parolintaj pri nia lingvo.

Por ke la kroniko estu kiel eble plej riĉa, multflanka kaj interesa, ni petas ĉiujn esperantistojn, kiam ajn ili sciiĝos pri io rilate al la afero Esperanta, ke ili tuj konigu tion al la redakcio, eĉ se estus la plej malgranda bagatelo; kaj kiam ajn iu trovos ian noteton pri Esperanto en ia gazeto, li volu kompleze transsendi la numeron al la redaktoro.

En la literatura parto estas akceptataj volonte ĉiaj artikoloj ensenditaj de la esperantistoj; tiaj artikoloj, kiuj povas esti aŭ originalaj aŭ tradukaj, devas havi ne sole senriproĉan lingvan formon, sed ankaŭ legindan kaj interesan enhavon. Ĉiu verkanto aŭ tradukisto penadu elekti por „L. I.“ ĉiam la plej bonan. Plu, la verkaĵoj prefere estu mallongaj ol longaj, ne pli ol ĉirkaŭe tri paĝoj. Niaj kunhelpanoj neniam forgesu skribi absolute

legeble kaj klare kaj sole sur unu paĝo de l'papero.

Krom la rubriko „Informejo“ k. e. ni havos konstantan parton de ŝercaĵoj, redaktata de s-ro Lengyel, al kiu oni povas transsendi tiajn enportojn.

Esperanto progresadas konstante, kaj la nombro de ĝiaj adeptoj multe pligrandiĝis dum la pasinta jaro, tial ni povas esperi, ke ankaŭ niaj abonantoj tre plimultiĝos. Por venki ni devas batali ĉiuj!

La redakcio.

Al ĉiuj estimataj esperantistoj, kiuj havis la bonecon sendi al mi siajn dezirojn je la nova jaro 1900, mi kore dankas, kaj deziras al ili la plej plenan feliĉon.

Paul Nylén.

KRONIKO.

.....

Esperanto kaj la Pariza Ekspozicio.

Sub tiu ĉi rubriko estis presita en n-ro 3107 de *Stockholms-Tidningen*, la 23-an de februaro la sekvanta artikolo, kiun ni rekomendas al la esperantistoj en ĉiuj landoj.

„Por multaj el la legantoj de l'gazeto (*Stockholms-Tidningen*) sendube estas konate, ke dum la lastaj monatoj kursoj je la lingvo internacia Esperanto havis lokon ĉe la instituto de Laboristoj en Stokholmo, ekzistantaj dank' al la iniciativo de d-ro Anton Nyström sub la kondukado de fil. lic. E. Etzel. La kursoj, kiujn vizitadis multnombraj kaj interesitaj partoprenantoj el ĉiuj societaj klasoj, donis bonan rezulton.

D-ro Nyström nun esperas rektan praktikan uzadon de la akiritaj sciadoj en tiu ĉi facile lernata kaj oportuna lingvo, lasante komenci en tiuj ĉi tagoj — kiel

sciigas hodiaŭ anonco — novan kurson por la servoj de tiuj metiistoj kaj laboristoj, kiuj ĵus ricevis la monan subtenon por viziti la Parizan Ekspozicion, kiun asignis la sveda *Riksdag* (la ĉambroj da deputatoj). Ĉar la granda plejmulto el tiuj sendube ne tiom konas ian fremdan lingvon, ke ili povus sukcese uzi ĝin en Parizo, kaj ĉar estas videble, ke en la mallonga daŭro da tempo, kiu restas, ili eĉ ne povos forigi tiun ĉi mankon, sekve la okazo nun donata al ili por lerni Esperanton devas esti tre bonveninta. La sperto efektive montris, ke homoj kun la fundamento de la solaj sciadoj de l' popola lernejo povas dum malmulte da lecionaj horoj lerni uzadi parole kaj skribe tiun ĉi lingvon. Kaj la laboristoj vizitontaj la Ekspozicion sendube povos en Parizo havi grandan utilon por sia studia vojaĝo dank' al tiu ĉi eblo povi interparoli kun la nemalmulta nombro da fremduloj, kiuj posedas la lingvon Esperanto.

La Esperantista societo „Espero“ en S. Peterburgo partoprenos en la Ekspozicio kun propra montro, kiu estos lokita en la unua grupo de la rusa sekcio. Tiu ĉi montro estos la centra punkto, kie la vizitantoj en la Ekspozicio parolantaj Esperante havos okazon enskribi siajn adresojn kaj kie ili povas esti certaj renkonti esperantistojn el ĉiuj landoj, el kiuj la plejmulto sendube kun ĝojo faros al siaj kolegoj ĉiujn servojn, kiujn ili kapablos, en formo de ciceronado, konsiloj kaj informoj de ĉiuj specoj.

Ke tio ĉi al svedaj laboristoj Esperante parolantaj estos granda utilo por ilia studia estado en la granda mondurbo, estas klare kiel la lumo de l' tago, kaj, konklude, ili devas kiel eble plej mult-

nombre uzi tiun okazon, kiu nun estas donata al ili kaj kiu havas multajn amikojn precipe en Francujo.“

= En n-ro 14 de *Stockholms läns tidning Gripem* (2. febr.), eldonata en Södertelje, ĝia subredaktoro, s-ro Ernst Spångberg, skribis tre favoran artikolon pri Esperanto, finiĝantan kun admono al ĉiuj, kiuj volas akceli la progresadon, ke ili ne prokrastu mendi lernolibrojn kaj vortarojn el la Klubo Esperantista Upsala.

La signaturo *H—g N.* skribis artikolon, kiun oni legis en la n-ro 42 de *Hel-singborgs Dagblad* la 13-an de febr. Ĝi enhavas interalie jenan diron: „La aŭtoro de tio ĉi ne havas eĉ la plej malgrandan konadon pri aliaj lingvoj ekster la sveda kaj Esperanta, sed per Esperanto li komunikigadis dum du-tri jaroj per tre viva korespondado kun unu franco kaj unu ruso kaj krom tio havis multajn aliajn okazajn korespondojn.“ — Tiu ĉi artikolo havis la plej bonan efikon, kian ni povis iam konstati, — ĉar dum la proksima tempo post ĝia apero, granda multo da leteroj petantaj informojn kaj lernolibrojn, alvenis al la Klubo Esp. Upsala.

Kursoj pri Esperanto. En la Instituto de laboristoj en Stokholmo d-ro E. Etzel donadis kursojn dum tiu ĉi vintro. Unu el la partoprenantoj en la unua kurso, sinjorino Fraenkel, sendis al ni raporton pri tio legatan en tiu ĉi n-ro.

Esperanto kaj la Pariza Ekspozicio. S-ro K. Ostanieviĉ sciigas nin, ke li jam mendis por tio vitromeblon je 165 rubloj.

Esperanta stenografio. S-ro L. F. Canet, stenografo, 11 str. Manigne en Li-

moges (Francujo), anoncas en „La Plume Sténographique“ la eldonon de l' Esperanta konformigo de la stenografia metodo du-pluajea. Kosto 2.25 fr. afrankite.

La supre dirita gazeto donas, krom siaj ordinaraĵoj pri Esperanto, ankaŭ ekzercadojn por traduko, kun premioj al la plej bone tradukinta.

N-ro 68 de tiu sama gazeto enhavas artikolon pri la stenografio en Svedujo, verkita en Esperanto por la redakcio de „La Plume Sténographique“, kiu tradukis ĝin en francan lingvon laŭ la Esperanta originalo.

.....

La Societo por la Propagando de Esperanto kaj la gazeto „L'Espérantiste“. — Ambaŭ fonditaj en januaro de 1898 tre sukcese agadis dum la pasinta jaro.

Laŭ la *Jarlibro 1899—900*, kiun la Societo eldonis, oni vidas, ke ĝi kalkulas jam 350 membrojn, — nombron tre ŝatindan post ekzistado de du jaroj.

Krom la propaganda laboro kaj la livero de precizaj kaj plenaj informoj pri Esperanto, la Komitato administranta koncentris sian zorgon speciale ĉirkaŭ la pligrandigo kaj profundigo de la scioj de l' societanoj, aranĝinte la ekzamenon, per kiu la dezirantoj akiras la *Ateston pri kapableco* instrui pri Esperanto; organizinte *Konkurson literaturan*, en kiu multaj partoprenis; kaj en la lasta tempo doninte sian atenton al la kreo de lokaj *Klubo Esperantistaj* inter la societanoj.

Ne sole en Francujo — kie la nombro de l' societanoj fariĝis pli ol duobla, — sed ankaŭ ekster ties limoj la Societo faris tre rimarkindajn progresojn,

precipe en Belgujo, Nova-Kaledonio, Suda Ameriko, Unuigitaj Ŝtatoj, Kanado, Svisujo, Italujo kaj Hispanujo.

Tri novaj kursoj pri Esperanto estis fonditaj dum la lasta jaro: unu ĉe la Lernejo praktika de komerco en *Limoges* (Limoj), dank' al s-ro Canet; la alia, en *Lille* (Lil), farita de s-ro Louvet, laŭ la peto de la *Unuiĝantaro de l' Junularo*, societo kiu de 15 jaroj organizas multe da kursoj publikaj; fine la tria, en *La Rochelle* (La Roŝel'), farita de s-ro Meyer.

La paroladoj estis pli multaj ol en la jaro 1898. En *Cette* (Set) s-ro H. Bel prezentis Esperanton al aŭdantaro de 200 personoj. En *Nantes* (Nânt) s-ro Mailloux faris paroladon tre rimarkitan en la *Klubo Pedagogia*. En *Roubaix* (Rube) s-ro E. Blanjean trovis la plej varman sukceson, klarigante al la membroj de la *Klubo Poliglota* la mirigan simplecon kaj la tutan mekanismon de Esperanto. En *Valence* (Valâns') per bonega parolado antaŭ 1200 personoj kunvenintaj en la teatron de l' urbo, s-ro Sibourg ne sole interesigis sed ĉarmis la apudestantojn. — En *La Rochelle* s-ro Th. Ruysen faris paroladon tre rimarkindan pri Esperanto.

La ĵurnalistaro plej ofte akceptis la Societon kun bonvolo kaj afableco. La francaj gazetoj, kiuj parolis pri nia lingvo dum la jaro 1899, estas tre multnombraj; el la fremdaj gazetoj ni nomas precipe la gravajn *New-York-Journal* kaj *O Paiz* brazilan. — Apartan memoron ni ŝuldas al la *Revo Concordia*, kie vidiĝas preskaŭ ĉiumonate artikoloj en nia lingvo; al *Petit Bleu*, kiu daŭrigas enpresi ĉiusemajnan kronikon en Esperanto; al *La Plume Sténographique*, kiu ĉiumonate re-

memorigas siajn legantojn pri Esperanto aŭ informas ilin pri ĝiaj progresoj.

Unu el la plej gravaj rimedoj por la sukcesa agado de l' Societo p. p. Esperanto estas ĝia organo „L' Espérantiste“. En marto de 1899 estis fondita la Aldono sole en Esperanto. Per tio ĉi la gazeto ricevis pli grandan indon ankaŭ por la eksterfrancaj esperantistoj. Ni povas diri, ke ĉio el la instrua kaj informanta enhavo, kio interesas la fremdulojn, estas presata Esperante ankaŭ en la gazeto mem; kaj la parto de speciala franca intereso estas tre malgranda. Tial ni povas varme rekomendi „L' Espérantiste“ al ĉiuj, — eĉ al personoj kiuj ne komprenas france.

BIBLIOGRAFIO.

Nova lernolibro. Rahwuswahelise keele „Esperanto“, täielik õpetus (lingvo internacia „Esperanto“, plena lernolibro.)

Ankoraŭ antaŭ ĉirkaŭe dekdu jaroj, kiam mi estis gimnaziano, mi estis konata kun estlanda viro, kiu lernigis min kelke da vortoj el sia lingvo, stranga por miaj oreloj, el kio restas engravurita en mia memoro la frazo: „Pääw paistab minu peale“, t. e.: „la suno brilas sur min.“ Antaŭ kelkaj tagoj, kiam mi ricevis tiun ĉi suprenomitan verkon, la lernolibron por estoj, mi tuj rememoris tiujn vortojn. Efektive, la taglumo Esperanta brilas sur nin de ĉiuj flankoj, nacio post nacio eliras el la ombro, por ke la komuna suno lumigu, varmigu kaj unuigu ilin ĉiujn.

La verko ŝajnas al mi, kvankam mi ne komprenas la estan lingvon, tre bo-

nega. Post malgranda enkonduko pri internacia lingvo entute kaj Esperanto aparte, sekvas la gramatiko, vortaroj esperanta-esta kaj esta-esperanta; la du paĝoj lastaj kun Esperanta teksto finiĝas per sciigo pri la gazeto „Lingvo Internacia“. La 64-paĝa verko portas la numeron 125, kaj kostas 20 kopekojn.

La aŭtoro de la libro estas s-ro H. Štalberg, konata kiel la pretiganto de l' Signetoj Esperantistaj. Al li helpis s-roj A. Pallasma kaj J. H. Vaňtrik; kaj s-ro F. Postnikov pruntis por la entrepreno 30 rublojn.

Paul Nylén.

*

Libro de l' humoraĵo. Kolekto da spritaĵoj. Redaktita kaj eldonita de Paŭlo de Lengyel, kun la helpo de L. de Beaufront. La antaŭparolon skribis Paŭlo Nylén. Prezo 3 frankoj.

„Ĝojo kaj ŝerco estas infanoj amin-daj de la feliĉo. Ni malfermu por ili nian pordon kaj akceptu ilin kiel gastojn bonvenintajn, kiam ajn ili venas nin viziti. Ili ne venas ja tro ofte resti ĉe ni...“

Tiujn ĉi vortojn skribas s-ro Nylén en la antaŭparolo de la Libro de l' humoraĵo. Oni devas konfesi, ke tiu ĉi libro estas kaj ĝoja kaj ŝerca, kaj tial ĝi estas inda, ke oni ĝin akceptu „kun malfermitaj brakoj“. El ĉiuj filozofiaj sistemoj la filozofio de l' humoraĵo estas la plej komune komprenata, la plej populara, kaj ofte ĝi ankaŭ estas tre profunda. La predikantoj de tia filozofio havas ĉie aŭskultantojn kaj iliaj ĝojaj doktrinoj ĉiam facile iradas de buŝo al buŝo. Tiu ĉi filozofio neniam maljuniĝos, neniam enuiĝos. Kaj ĝi estas komprenata en ĉiuj tempoj kaj amata en ĉiuj landoj.

La Libro de l'humoraĵo havas tian komune-humanan karakteron, se eĉ ne ĉiu el ĝiaj multaj anekdotoj apartenas al la profunda humoro. Sed ili tamen estas tre amuzantaj kaj elektitaj kun granda distingado kaj bona prijuĝo.

La libro enhavas ankaŭ rakontetojn, kiuj estas tre facillegataj kaj amuzas multe. La plej granda parto de la enhavo tamen konsistas el „bagateloj“, inter kiuj multaj estas ornamitaj kun ilustraĵoj, kiuj preskaŭ sen escepto meritas la epiteton *artistaj*, kaj kies humoraĵa indico estas tre granda. La solaj ilustraĵoj estas ridigaj jam sen la teksto.

La libro devas esti tre oportuna por uzi en la kunvenoj de kluboj, kie estas multaj novuloj kiuj ne tute ellernis la lingvon internacian. La „bagateloj“ estas sufiĉe facilaj, mallongaj kaj amuzantaj por esti tre bona materialo por buŝa kaj orela ekzercado en Esperanto.


Mi ne povas rifuzi al mi citi kiel ekzemplon unu el la bagateloj:

Angla lernolibro. The international language „Esperanto“. Complete Instruction-Book with two Vocabularies. Translated after the Russian of Dr. L. Zamenhof by R. H. Geoghegan. Price 6 pence or 12 cents. Eldonita per la „Kapitalo de D-ro Zamenhof.“

Tiu ĉi verko, kiu estas nova eldono de n-ro 52 kaj ankaŭ portas tiun saman n-ron, estas — laŭ la surskribo — eldonita per la „Kapitalo de D-ro Zamenhof“ fondita en 1897 sekve de la dekjara ekzistado de Esperanto.

Jam en la printempo de 1898 mi ricevis de la Societo „Espero“ en S. Peterburgo, kiu administradas tiun ĉi fondkapi-

Riproĉo.



La tajloro kolere diras al sia ŝuldanto:
— Vi promesis antaŭ ses monatoj, ke via riĉa onklo baldaŭ mortos. Kaj jen, — li vivas ankoraŭ.

Anders Roswall.

talon, la honorigan komision prizorgi la eldonadon (el la presejo en Upsala) de la angla propaganda broŝureto kaj la angla lernolibro. Laŭ mia propra kompreno kaj la ŝatindaj konsiloj de d-ro Zamenhof mi aranĝis la eldonojn. Bedaŭrinde nek la administrantoj de la Kapitalo nek mi komunikigis antaŭe kun la aŭtoro s-ro Geoghegan, kiu jam delonge transsendis la manuskripton de l'propaganda broŝureto k. t. p. Tial la eldono estis por li surprizo, ĉar li mem estis verkanta plenan lernolibron kun kontentigo de la specialaj bezonoj kaŭzitaĵoj pro la diferenco inter la lingvoj angla kaj Esperanta.

Ĉar tamen du apartaj lernolibroj por angloj ne devas esti ia malutilo, sendube

neniu volus bedaŭri, se ambaŭ estus pretaj samtempe, — tiom pli, ke la Nord-amerikaj gazetoj jam komencis dediĉi atenton al Esperanto, kaj la intereso por nia lingvo baldaŭ povos esti granda en Nord-Ameriko kaj en Anglujo.

Pro kelke da malfacilaĵoj ĉe la presejo kaj malfruigo de la bindisto, la verkoj ne estis tute pretaj kaj vendeblaj antaŭ ol en la komenco de 1900.

Ni rekomendas tre varme la anglan lernolibron, kies prezo estas 6 pencoj aŭ 12 cendoj, kaj la broŝureton (10 ekz. kostas 10 c. aŭ 6 p. kun afrankita sendo) al ĉiuj, kiuj povas konigi Esperanton en la angle parolantaj landoj, kie la esperantis-toj estas ankoraŭ tre malmultnombraj.

Paul Nylén.

Kurso pri Esperanto

ĉe la instituto de laboristoj en
Stokholmo.

Aliafoje mi eble havos okazon raporti en la kolonoj de tiu ĉi gazeto, en kia maniero miaj okuloj estis malfermitaj al la utilo de lingvo internacia, mi, kiu antaŭ iuj mallongaj semajnoj je mia fiereco pensis kaj diris proksimume tiel: „Kial tiu persono, kiu konas kvar-kvin eŭropajn lingvojn, bezonus lerni artefaritan?“ Humile mi nun konfesas, ke mi eraris. La kontraŭulino fariĝis propagandistino. Kvankam estante jam antaŭlonge elveninta el la lerneja aĝo, mi nun sidiĝis sur la benkon de lernantoj, lernis lecionojn kaj skribis temojn.

Doktoro Etzel, kiu longe deziris varbi anojn al la lingvo internacia instruante ĝin, konsiliĝis dum la pasinta aŭtuno kun d-ro Anton Nyström, tiu inda kondukanto

en la batalo por la fratigeo de l' homaro. D-ro N. metis salonon en la Instituto de laboristoj al la dispono de d-ro Etzel, kiu dum la pasinta decembro anoncis pri senpagaj kursoj pri Esperanto. Ĉirkaŭ kvardek partoprenantoj notis sin, el kiuj ĉirkaŭ unu triono deziris komenci tuj. — Estante maleble instrui kvardek samtempe, la lernantoj devis partigi sin en du-tri grupojn. Se d-ro Etzel estus antaŭvidinta la perdon de tempo kaj peno, kiun li suferus, li ne estus partinta sian amason en kia ajn maniero. Li estus certe devinta kunigi en saman grupon personojn sciantajn la nacian gramatikon, kaj en alian tiujn, kiuj senestis tian scion aŭ posedis malmultan. Nun tio malĝusta okazis, ke viro kun akademiasciigoj estis instruata kune kun korplaboristoj sen la plej malgranda komprenaĵo pri la gramatiko. El la vidpunkto de l' moralo la malfeliĉo fariĝis feliĉa, ĉar la instruanto kaj la pli lertaj lernantoj havis okazon ekzerci paciencon, kaj mi konfesas, ke tiu antaŭa tenis la provon pli bone ol la lastaj.

Tiel pereigis, jam de la komenco, la unua penso de la d-ro Etzel, ke liaj plej multaj lernantoj devis esti korplaboristoj kaj personoj sen lingvosciigoj. El la unua grupo, kiu komencis dum la mezo de decembro, foriris dum ĉiu semajno diversaj lernantoj kaj fine ni estis nur ses inter kiuj nur kvar partoprenis ĉiufoje ĉe la instruado. Estas videble, ke la lernantoj kun pli grandaj lingvosciigoj timigis la komentantojn, kiuj tial petis d-ron Etzel aranĝi kun ili novan kurson tuj, kvankam la unua daŭriĝis.

La lernolibro, kiun ni sekvis, estas tiu de s-ro Paul Nylén, kaj ni uzis ankaŭ la vortarojn sved-esperantan kaj esper.-svedan de tiu ĉi verkisto. Kontraŭ tiuj ĉi

libroj oni povas fari la rimarkon, ke ili estas tro neplenaj por komencanto. Tiu, kiu penetris pli longe en la lingvon, akiras kredeble spertecon formi novajn vortojn.

Ĉiu kurso konsistas el dek aŭ dekdu lecionoj, kaj ŝajnas al mi, ke tio ĉi estas sufiĉe kiel fondo sur kiu konstrui. Niaj lecionoj havis lokon en la dimanĉomatenoj je la horo deka ĝis duono antaŭ la tagmezo kaj unu simplatagavespero je la oka ĝis duono antaŭ la deka. Ĉiu lernanto pagas dudek kvin oerojn por leciono.

Dro Etzel, ligante kun scioj en sia objekto kaj intereso por ĝi la donon de klara kaj viva maniero de instruado, ni, liaj lernantoj, partoprenis kun ĝojo en la instruado, kaj je ĉiu leciono ni vekigis pli multe pri la utilo de lingvo internacia ĝenerale kaj precipe pri l' bonegeco de Esperanto.

Dum la lecionoj ni tradukis la pecojn de la lernolibro, ni skribis ekzercajn tezojn sur la tabulon nigran kaj ni tradukis parole kaj en Esperanton kaj en la lingvon svedan. Krom tio ĉi ni tradukis ekster la lecionoj malgrandajn pecetojn laŭ propra elekto.

Unu inter miaj kolegoj tenis en la antaŭvespero de la nova jaro, post la sesa leciono, bonegan paroladon sen lingveraro al la instruanto, alia lernis parkere la tutan vortaron kaj unu tria akiris grandegan spertecon je la formado de novaj vortoj.

Kian rezultaton la instruanto povos atingi kun la dua kaj la sekvantaj kursoj, alia eble rakontos, sed en ni, siaj kvar unuaj lernantoj en Esperanto, li vekis varman intereson, kaj tio ĉi estas la ĝusta kaj la plej alta celo de ĉiu instruado.

Louise Fraenckel.

Kion ni devas fari antaŭ ĉio?

En Rusujo iam estis verkisto — Krilov, kiu verkis multe da bonaj fabeloj. Unu el tiuj ĉi fabeloj mi volas rakonti aŭ rememorigi al niaj amikoj. Tiu ĉi fabelo estas verkita per bonaj versoj; sed ĉar mi tute ne havas talenton de versisto, mi simple rakontos la enhavon de tiu ĉi fabelo. Jen, estas ĝia enhavo:

Cigno, ezoko kaj kankro.

Unufojon cigno, ezoko kaj kankro komencis veturigi ŝarĝitan veturilon. La cigno flugis al la ĉielo, la ezoko tiris en riveron kaj la kankro rampis posten. Ĉiuj ili laboris tre fervore kaj la ŝarĝo ankaŭ ne estis malfacila, sed tamen la veturilo ĝis nun staras sur la antaŭa loko.

Morinstruo: Se kolegoj ne havas unuigecon, ilia afero neniam sukcesos.

Se Krilov vivus en nia tempo, oni povus ekpensi, ke li verkis tiun ĉi fablon, rigardante nin esperantistojn kaj nian komunan aferon: tiom tiu ĉi fabelo similas al ni!*)

Efektive, kian malegalan, malligitan, neorganizitan amason da homoj prezentas nun la esperantistaro! Kian senordan tumulton prezentas iliaj intencoj, pensoj kaj laboroj! Kaj kiom senfrukta kaj malprospera estas ĉio tio ĉi! Ni ĉiam fanfaronas, ĉiam trompas unu la alian, eldirante laŭtajn frazojn pri sia sukceso, kaj hontinde staras preskaŭ sur unu loko.

Kaj ni ne devas miri pro tio ĉi, ĉar alie ĝi ne povas esti ĉe nunaj kondiĉoj: nia afero iras nun kun kovritaj okuloj, aŭ pli vere, tute sen kapo. La aŭtoro de nia lingvo kaj mastro de nia afero s-ro Zamen-

*) Mi scias, ke kelkaj esperantistoj estos ofenditaj per tiuj ĉi miaj vortoj, sed mi ĉiam preferas paroli al miaj amikoj malagrablan veron, ol agrablan malveron.

hof staras nun flanke de nia afero kaj tute ĉesis gvidi kaj unuigi la laborojn de la esperantistaro. Kaj tio ĉi estas tre komprenebla: li jam sufiĉe laboris por sia granda ideo, tiom laboris, kiom povas labori plej forta, plej energia homo, kaj nun li bezonas ripozon. Homo ja ne estas senlaca maŝino.

Vi prezentu al vi la sekvantan. La reĝomonarĥo forlasis sian regnon kaj diris al sia popolo: „De nun vi mem vivu kaj administrigu kiel vi volas.“ Kaj jen, la popolo komencis vivi sen reĝo, per nenio anstataŭigis lin kaj eĉ tute ne zorgas pri tio. Anstataŭ fondi administradon, la popolo skribas en gazetoj pri diversaj siaj societaj bezonoj: kiel estus pli bone aranĝi juĝon, policon, bankon kaj cetere. En la gazetoj ĉiam aperas plej bonaj, plej saĝaj, plej facile plenumblaj projektoj. Sed ĉiuj tiuj ĉi projektoj restas sen plenumado, ĉar la popolo ne konjektis antaŭ ĉio fondi oficejon, kiu devus pripensadi, alprenadi kaj plenumadi la projektojn. *) Kaj tiel la popolo restas nur ĉe granda, ĉiam kreskanta amaso da projektoj, kiuj, sendube, neniam efektiviĝos.

La situacio de tiu ĉi popolo estas tre simila al la nuna situacio de nia malgranda popolo — la esperantistaro. Ni ankaŭ restis sen mastro kaj sen ia administrado kaj nun ni vane tumultiĝas kun niaj bonaj pensoj, intencoj kaj projektoj, kiuj, kredeble, ankaŭ neniam efektiviĝos.

Kiel do ni povas eliri el tiu ĉi situacio? Kiel ni povas fari por ni administradon, kiu unuigus niajn fortojn kaj farus nian laboron fruktoportanta kaj nian aferon

*) Tuta popolo ja ne povas sin okupi per aferoj de administrado.

sukcesa? Mi pensas, ke por tio ĉi ni devas fondi apartan komitaton, kiu havus la rajton alpreni ĉian bonan projekton kaj zorgi pri ĝia efektivigado. Tiu ĉi komitato devas ankaŭ serĉi rimedojn por aprobita projekto (ekzemple per alvoko al ĉiuj esperantistoj pri mona oferado). Tiu ĉi komitato devas esti kunmetita de s-ro Zamenhof mem el esperantistoj plej laboremaj, plej kapablaj, plej aldonitaj al nia afero. Tiu ĉi komitato devas esti plene-potenca mastro de nia afero kaj devas esti nedisputebla aŭtoritato por ni ĉiuj. Ĝi povus esti organizita tiel: 20—30 diversnaciaj esperantistoj, vivantaj en diversaj landoj, estas membroj de la komitato. Unu el ili estas prezidanto de la komitato. La prezidanto anoncas en nia gazeto, ke tiu aŭ alia projekto (propono, opinio) devas esti prijuĝita. La membroj de la komitato sendas al la prezidanto en difinita tempo siajn opiniojn pri la prijuĝata projekto. Se estos kolektitaj ne malpli ol $\frac{2}{3}$ da ĉiuj voĉoj de la komitataj membroj kaj se ne malpli ol $\frac{2}{3}$ da kolektitaj voĉoj estas aprobantaj, la prijuĝita projekto estas alprenita kaj la komitato zorgas jam pri tio, ke la alprenita projekto estu eble plej baldaŭ efektivigita. Se la projekto ne estas alprenita, sed havas por si ne malpli ol $\frac{1}{2}$ da sufiĉe kolektitaj voĉoj, ĝi post unu jaro devas esti ree prijuĝata de la komitato, kaj se ĝi ree ne estos alprenita, ĝia sorto jam estas finita kaj ĝi jam ne povas esti iam ankoraŭ prijuĝata. — Ĉiuj ceteraj projektoj, havantaj malpli ol $\frac{1}{2}$ da kolektitaj voĉoj, estas forĵetataj por ĉiam, tuj post la unua voĉdonado.

Mi pensas, ke se tia komitato estus fondita, nia afero tuj elirus el ĝia nuna, preskaŭ morta senmoveco, kaj ni, espe-

rantistoj, ne ricevus surprizojn, similajn al la neatendita halto de nia gazeto, kaj ne restus sen efektivigado multaj niaj projektoj, tre utilaj, tre plenumebraj kaj eĉ postulantaj preskaŭ nenan monan elspezon.

Novembro 1899.

M. S. Rakítski.



LA UNUA NEĜO.

Ho, ĉirkaŭdancu dense en l' aero,
Mi vin salutas, bela neĝ' unua!
Gajiĝas nun eĉ mia kor' enua,
Kaj estas ree plena da espero.

Mi ne malgajas plu, ke sur la tero
Nudigis ĉion la aŭtun' detrua,
Ke ne ridetas plu ĉiel' la blua,
Ne velkis ĉiuj floroj de espero.

La vintro venas, en la neĝ' malvarma
La nuda tero dormos, — sed pli ĉarma
Ĝi unu fojon ree maldormiĝos.

Ho, dormu ankaŭ, mia kor', trankvila
En via neĝ', vin vekos sun' la brila, —
Post longa vintro ree printempiĝos!

Sigurd Agrell.



Nia domo.

De Helena Lassen.*)

Afable, helverda dometo kun viaj
hirundoj somere kaj via neĝo vintre!...
Ĉiam vi al mi aperas ĉirkaŭata de flugiloj

*) La verkistino, pastredzino Lassen, jam de multaj jaroj loĝadas en la plej malgranda paroĥo de Norvegujo, kuŝanta en dezertega kaj nuda regiono de l' montegaro. Nur rajde oni povas alveturi la domon de l' pastro, ĉar neniaj vojoj kondukas en tiun ĉi ŝtonan dezertaĵon, kie dum 9—10 monatoj ĉiujare la fundo estas kovrata per neĝo.
Rim. de la tradukinto.

flirtantaj aŭ molaj, malpezaj flokoj. Verdaĵ arboj ne bruetadas kaj murmuretas ĉirkaŭ vi kiel ĉirkaŭ aliaj pastraj domoj, kaj tial por vi fariĝus tre sole, se ne venus hirundoj kaj neĝo vin vigligantaj per sia dancado petolema. Kiam mi staras sur la monteto kaj vin rigardas, mia koro estas tuŝata. Vi ja estas multe tro malgranda, tro luma por kuŝadi tiom sola sur la montego, kaj tiom brave vi bataladas kontraŭ la soleco.

Neniam vi plorus je tio, ke al vi mankas la societo de arboj. Vi kontentiĝas je la certeco, ke vi havas pli multajn hirundojn kaj pli multe da neĝo ol iu alia pastra domo en tuta la lando. Sed al kiu venis la bona ideo pentri vin verdeta kiel la folioj kaj burĝonoj de printempo? Al iu, eble, el tiuj palaj junaj pastredzinoj, kiuj tiel nombre estas trovataj en nia dezerta regiono, kaj kiuj fariĝis tiel palaj kaj silentaj pro tio, ke ili estis ŝiritaj el sia propra kreskejo kaj transplantitaj inter neĝon kaj ŝtonon.

Eble ŝi iam staris ĉi-tie en la neĝo rigardante la blankajn terasojn kaj la blankajn montegojn, ĝis malmulte post malmulte ŝi tute glaciigis.

Eble estis tago en la fino de majo, eble eĉ en junio; ŝin prenegis sopiro konsumanta je herbo, je arboj verdantaj, kaj fine ŝi ekmalpacientiĝas. Ŝi volas ion fari, ion tute ribelegan, — sed kion? La rigardo falas sur la domon, blankan kiel monaĥino ankaŭ ĝi, kaj ŝi eksentas, ke plu ŝi ne povas toleri tiun ĉi koloron malvarman. Per la piedeto ŝi ekfrapas la fundon kaj elvokas al sia edzo: „Venu, pentru ni almenaŭ la domon verda!“

Sed fine la pastredzinoj sin konsolas per la hirundoj. Jes, la hirundoj ĉi-tie vere meritus, ke oni skribu pri ili rakon-

teton, aŭ pli ĝuste, poemon, — ne, ankaŭ poemo ne taŭgus, serenado estus la sole konvenanta. Kiam post gaja taglaborado ili ripozas en siaj nestoj sub la tegmento; kiam en la lumeta krepusko de somera nokto ili dum momento defaligas la flugilojn, fermas la kantantan, ĝojegantan bekon kaj apogas la feliĉan kapeton sur la brusto de l'edzo, tiam mi volus kanti mian serenadon, — serenado pli plena je amo ol tiu, kiun sub la balkono de l'amatulino kantas la junuloj de la Sudo.

La hirundoj, jen nia somero! Per sia kantado gajega ili igas nin forgesi, ke tie ĉi estas trovataj nek siringoj aŭ rozoj, nek alaŭdoj aŭ ĉio alia, kio apartenas al la printempo. Kiam ian tagon post la vintro ili sidas sur la tegmento kvazaŭ de l'nuboj falinte kaj pepadas, ridas, babiladas, — kiu povus malhelpi, ke li fariĝas gaja kaj kontenta kiel hirundo?

Por aŭskulti ilian plej intiman babiladon ni ŝteliĝu sur la subtegmenton kaj metu la orelon sur la plankon, kie nur maldika ligna muro nin disigas de la nestoj. Kiaj disputoj! Estas ordinare nur ŝereo, sed oni estu konvinkita, ke ne estas idilio senmalhelpita eĉ la edzeco de l'hirundoj. Baldaŭ do ĉesas iliaj malpacoj kaj disvolvigante siajn flugilojn ili dronigas ĉiujn ĉagrenojn en la blua aero de l'montego.

Poste, kiam alproksimiĝas la aŭtuno, kaj la grandaĝaj hirundoj fariĝas tute prudentaj kaj saĝaj, tiam la junularo nin plej interesas. Kiom ĉarmaj estas la graciaj etuloj farantaj siajn unuajn provojn en la arto de flugado! Ili devas esti tre diligentaj por bone sin ekzercadi ĝis la vojaĝo. Ifoje mi vidis, kiel ĉiuj hirundoj de l'pastra domo kaj de l'najbaraj kortoj kunvenis sur la tegmento de nia lernejo. Estis, verŝajne, la granda ekzameno, ĉar ĉiuj

nun fariĝis tiel lertaj, ke estas granda plezuro ilin vidi. Ĉiam pli longedaŭraj fariĝas la malcertaj flugilfrapoj, ĉiam pli mallonge ili ripozigas siajn rondajn korpetojn sur la brila ardezo de l'tegmento, ĉiam pli malmulte ili aŭskultas la vokojn kaj admonojn de la gepatroj, kaj ĉiam pli ili ĝojiĝas je la granda vojaĝo trans la maro, pri kiu iam rakontis al ili la patrino.

Ian tagon post la granda ekzameno ni rimarkas, ke estas tiom mirinde silente ekstere. Foririntaj estas la hirundoj! Foririntaj jam en frua mateno, dum ni ankoraŭ dormis, foririntaj sen danko, sen adiaŭ. Sen danko — jes, certe! Sed kiam mi pensas je la ĝojo, kiun ili faris al ni, tiam mi devas konfesi, ke jam de longe ili pagis la lupagon. Estas ni, kiuj ŝuldas al ili dankon kaj tiun ŝuldon mi plezure plenumos. — „Dankon, kara hirundo, por la mallonga sed riĉa ĝojo, kiun vi somere faras al ni! Revenu ĉiujare kaj pretigu ĉe nia helverda dometo vian neston. Neniam nin forlasu, ĉar se vi ne venus kiel anstataŭigo de l'siringoj kaj rozoj kaj ĉio, kio ne povas vivi en la mallonga somero de l'montego, tiam nenia somero tie ĉi estus. Sed via kanto pliindas la odoron de l'siringoj kaj pli bela ol la purpuro de la rozoj estas via brusto brileblanka. — Dum tiu daŭro, kiam vi ne ĉesas veni, ni ne sopiras je la odoro de floroj; sed se vi forestus, hirundeto, tiam ni plorus je vi, je la rozoj, kaj je la somero.“

Kiam estas foririntaj la hirundoj, tiam venas la neĝo. Ĝi alvenas jam antaŭ ol la betulo faligis siajn foliojn. Estas delikata, gracia betulo iam plantita en la mezo de la „ĝardeno“. Dum unu aŭ alia jaro ĉiuj pastredzinoj klopodas pri tiu ĉi ĝardeno, sed poste ili laciĝas. Parte, la somero estas tro mallonga; parte, ĝi

vivas en tro intima societo kun la domaj bestoj. Jen, la ĉevalo plezure sin ruladas en la salato, la ŝafoj ĉion mordetas kaj la hundo volas kaŝi siajn plej delikatajn ostojn tie, kie ĵus ekburĝoniĝis pala floreto. La bovido, ĝuanta de sia libero, englutis delogantan flavan floran, okaze malfermiĝintan antaŭ ol venis la neĝo, kaj la kokinoj ĉieloke gratadas. Kiam fine la pizoj tute gaje-malgaje floradis meze en la neĝo, kaj la karotoj egalis al lignaj pecetoj, tiam la malfeliĉaj pastredzinoj konvinkiĝis, ke estus pli bone forlasi ĉiujn revojn pri ia „ĝardeno“.

Tial la betulo nun staras tute sola, batalante kontraŭ neĝo, malvarmo kaj ventegoj. Ĉiuj loĝantoj de l' dometo ĝin amas kaj honoras. Forpreni de l' betulo eĉ unu branĉeton estus blasfemaĵo, — ĝi ja estas nia sola arbo!

La betulo estas la plej hardigita el ĉiuj arboj kaj estas trovata ĝis proksime al la neĝo eterna, — jen mallonga noto en la naturhistorio. Sed permesu al mi rakonti miajn proprajn pensojn pri tio, ĉar neniu kredigos al mi, ke la bela, gracia betulo estas farita el pli maldelikata ŝtofo ol la pino aŭ abio. Kompreneble estis la intenco de la naturo, ke tiuj ĉi fortegaj, firmaj arboj plej alte suprenrampu sur la montego kaj tute ne la betulo, la delikata junulino. Sed ili ne volis. Malluma, malgaja staris la arbaro, sen vivo sen virina gracieco. Nudaj staris la krutaj deklivoj, nenia luma foliaĵo ilin ornamis, ĉar la betulo ankoraŭ loĝadis en regionoj pli varmaj kaj riĉaj. Ŝi kaj ŝiaj fratinoj je tiu tempo certe estis la plej sentemaj, delikataj kaj prizorgataj el ĉiuj arboj. Sed iafoje, kiam la birdoj de l' nordo faris sian vinttran viziton, ili rakontis al ŝi pri la nordaj landoj, pri neĝo kaj glacio kaj pri pinoj,

kies pingloj pikas kaj vundas. La dolĉa betuleto ekscitiĝis. „Kiel fratino kompatema mi volas tien migradi. Mi volas helpi al ili forigi la sopiron je la varmo de l' sudo, mi karesos ilin per miaj molaj folioj kaj mi permesos al vento balanci miajn longajn pendaĵojn, por ke miaj ĝerموj vaste disĵetiĝu kaj alportu iom da vivo kaj koloro al iliaj arbaroj malgajaj“, — tiel pensadis la malgrandulino.

La penso disvastiĝis kaj la dolĉaj, oferemaj fratinoj grandare migradis en la nordon. Klopode ili tie antaŭeniris praktike la virton de la sinforĝesemeco. Neniam ili kuraĝis aŭskulti la kantojn delogantajn de l' sudo, sed fervore ili daŭrigis suprenrampi la krutajn deklivojn, — ĝis fine ili fariĝis la plej persistaj el ĉiuj arboj.

Kiel rekompenco por iliaj amplenaj faroj ili ne bezonis portadi laboran veston kaj ekhavi malmolajn labormanojn. La Kreinto permesis al ili konservi la helverdan foliaĵon, la brileblankan trunkon kaj igis ĉiujn poetojn ilin glorigi.

Nia betulo laŭ rekta linio devenas de sia nobla avino. Ĝi estas la kompatema fratino de la pastra domo, estas ĝia elokventa, malgranda predikisto, kiu parolas pri humileco, sinoferemo kaj kuraĝo. Ĝi pravas al ni la eblecon esti transplantita en neĝo. — Tion ne povis la hirundoj, ĉar ili foriras, kiam venas la neĝo.

Falu, blanka neĝo! Nenion malbonan ni diru pri vi. Estas vi, kiu tiel belege ĉion ornamas en Kristnasko kaj briletas tiel klare kiel kristalo, — tiel klare, preskaŭ, kiel la steloj. Estas vi, kiu preparas la krutajn deklivojn por la irado per neĝaj glitiloj. Estas vi, kiu

iam farigos la riveretojn bruantajn de la printempo. Kaj pro tio ni ne plendos la malĝojon vin akompanantan.

Falu, blanka neĝo! Frapu kaj frapagu niajn fenestrajn vitrojn, turniĝu super nia tegmento, amasiĝu kiel montetoj kaj turoj. Baru ĉiujn niajn vojojn; per la helpo de niaj neĝaj glitiloj ni prenos aliajn kaj en viaj blankaj, freŝaj ondoj ni banos.

Jen, kiel sin prezentas nia domo, nia malgranda, helverda loĝejeto. Dankon por la hejmo, kiun vi donis al ni sur la monto kaj Dio vin benu!

El la norvega lingvo tradukis
HILDA C—D.



NIJINO.

Rakonto de N. (el franca lingvo).

En Alĝerujo iam vivis tre riĉa gentestro kun la nomo Mazodo; li havis saĝan kaj belan sklavinon, kiun li tiel ekamis, ke li eĉ edziĝis je ŝi. Oni nomis ŝin Nijino (kio signifas *stelo*).

Ŝi estis virino tre laborema kaj bona mastrino: ŝi eterne klopodis mem, donadis ordonojn al la servantoj, kiujn ŝi ne fidis, observis, administradis, foriĝis kaj eĉ per propraj manoj preparadis manĝojn por la edzo, sed en tiu tempo, kiel ĉiuj virinoj posedantaj tiajn indojn — ŝi malgrandigis siajn bonegajn ecojn, ĉar tro deziris montri al ĉiuj, ke ŝi ilin posedas, kaj precipe al la edzo, ĉiam ripetante kaj aldonante preskaŭ al ĉiu vorto la saman sentencon; kiam Mazodo laŭdas iun ajn manĝaĵon aŭ ĝojas je feliĉa fino de malfacila entrepreno, alportinta al li gravajn oportunojn, Nijino ĉiam paroladis:

— Kun saĝa edzino ankaŭ la edzo estas saĝa . . .

Ŝi ripetadis tion ĉi tiel ofte, ke por la edzo ĝi fariĝis tre teda.

— Certe! — li diris al ŝi en unu bela tago, — mi estas tre ĝojata, ke mi edziĝis je vi; vi enportis en mian domon la ordon, sed rilate al eksteraj aferoj, permesu al mi pensi, kara mia Nijino, ke ili iras bone ne sole danke al viaj ecoj.

— Kio! — sinmalklarigis Nijino, — se viaj aferoj iras bone, sole ĉar vi ilin bone pripensadis . . . ĉu vi povus ilin tiel pripensadi, se veninte hejmen, vi vidis, ke via edzino sin turnas antaŭ la spegulo kaj via manĝaĵo estas aŭ trokuirita aŭ kruda. Ne, kredis al mi: kun saĝa edzino ankaŭ la edzo estas saĝa.

— Tio ĉi montras, ke vi pensas . . .

— Ke vi sen mi ruiniĝos kaj en via domo ĉio kondutos sence, — vive rediris Nijino, — jes kaj mi ne sole opinias tion ĉi, sed eĉ estas konvinkita je tio . . . kun saĝa edzino ankaŭ la edzo estas saĝa.

— Nijino! — interrompis en sia vico Mazodo, — mi malpermesas al vi ripetadi tiun ĉi sentencaĵon, per kiu vi tedas min de mateno ĝis vespero.

— Sed mi volus konvinkigi vin, ke ĝi estas justa, — diris Nijino.

— Konvinkadi min vi povas per siaj agoj, sed ne per vortoj.

— Permesu rimarki, mia edzo kaj potenculo, ke la vortoj miaj estas konstatataj de miaj agoj. Kie vi povas trovi virinon pli akuratan, pli lertan kaj pureman ol min; kiu vekigas pli frue kaj endormas pli malfrue ol mi?

— Sed konfesu, Nijino, — diris Mazodo, — ke ĉiuj viaj deziroj estas plenumataj, ĉar mi konstante estas por vi la plej malsevera estro kaj la plej delikata edzo.

— Tio ĉi argumentas, mia potenculo, — obstine ripetis Nijino, — ke kun saĝa edzino ankaŭ la edzo estas saĝa . . .

— Ne, tio ĉi ja estas tro! — ekkriis kolere Mazodo, — kun vi mem Mahometo povas perdi la tutan paciencon. Nijino, aŭskultu: mi ĵuras je nomo de la profeto, ke se vi ankoraŭ diros la saman sentencaĵon, mi tuj disigōs kun vi, kaj vendos vin al alia potenculo.

Post iom da tagoj, post tiu ĉi mal-kvieta familia sceno, Nijino staris kun la edzo ĉe la fenestro kaj ili ekvidis, ke unu malriĉe vestita homo trairas la placon. La homo portis sur sia dorso ligon da lignoj.

— Rigardu tiun ĉi homon, — diris Mazodo, — li iam estis riĉa kaj eminenta, sed nun li mem portas lignojn por vendo.

— Ho, mi scias, kial ĝi okazis, — diris ŝi.

— Kial do?

— Ĉar li, kredeble, havis malzorge-man, malbonan edzinon.

— Ĉu vi pensas, ke ĝi efektive povis lin ruinigi?

— Certe! Kun saĝa edzino ankaŭ la edzo estas saĝa, — respondis Nijino.

— Vi estas obstina kaj malsaĝa ekzistaĵo! — ekkriis furioze Mazodo aŭdinte denove la malestimatan sentencaĵon, kiun la edzino kuraĝiĝis ripeti malgraŭ lia malpermeso, — ĉar vi efektive ne estas korektebla, mi ĵuras, ke mi efektivigos mian intencon.

Li sin alklinis el la fenestro kaj alvokis komercaĵiston, kiu envenis la ĉambron antaŭ ol Nijino konsciiĝis de mirego; ŝi ne kutimis tiajn kolerajn agojn de sia edzo.

— Tiu ĉi virino estas mia sklavino, — diris Mazodo, — ĉu vi volas ŝin aĉeti?

— Mi ne estas tiom riĉa, por ke mi povus aĉeti la virinon, — respondis la komercaĵisto.

— En tiu okazo mi donacas ŝin al vi kaj aldonas ankoraŭ tricent piastrojn, — rediris Mazodo, kiu estis tiel kolerita, ke li eĉ ne aŭdis la ĝemojn de Nijino, — sed kun la kondiĉo, ke vi forveturu el Alĝerujo kaj neniam revenu tien ĉi.

— Por tia kosto mi prenas vian sklavinon senmarĉande, — respondis la komercaĵisto, rave admirante la estetikajn figuron kaj belegan vizaĝeton de Nijino.

Dirite, farite.

Post unu horo Nijino plora kaj plena je malespero kun sia nova sinjoro forlasis Alĝerujon.

Ili per ŝipo bone alveturis en Alepon. Tie ili aĉetis en bazaro malgrandan butikon per la tricent piastroj ricevataj de Mazodo.

Saido, la nova edzo de Nijino estis laborema homo. La transportitaj per li returnitoj de sorto ekinstruis lin esti tre singardema. Nijino, kiel ni jam scias, estas lerta kaj bona mastrino; de unu flanko la edzo — laboradis, de alia la edzino — ekonomadis, kaj tial iliaj aferoj sinmovis antaŭen.

Saido baldaŭ riĉiĝis kaj akiris la plej bonan butikon en la tuta bazaro.

Pasis tri jaroj. Unufoje, kiam Nijino en la butiko preparadis ĉe la tablo manĝojn, ŝi ekaŭdis, ke la edzo parolas kun iu homo, kies voĉo ŝajnis al ŝi konata. Laŭ scivolo aŭ iu alia sento, ŝi malfermis la pordon kaj observadis la alilandulon ĝis li eliris kun ŝia edzo.

Ŝi nevole aŭdis tute ilian paroladon, per kio ŝi konkludis, ke la alilandulo volas vendi grandan kvanton da kafo kaj proponas ĝin al Saido.

Kiam ŝi ekvidis, ke la edzo revenis sola, ŝi demandis lin tre serveme, ĉu li konas tiun homon, kun kiu li ĵus paroladis.

— Ne, — respondis Saido, — sed li havas bonegan kafon, kun kiu mi tre volonte konatiĝos.

— En tiu okazo, — diris la edzino, — invitu lin morgaŭ al ni por trinki kafon kaj demandu, ĉu li povas ludi je ŝako, kaj se li amas tiun ĉi ludon, tiam vi kun via lerteco ne timus konkuranton kaj vi povos aĉeti komercaĵon ĉe tiu ĉi alilandulo, per la kosto, kiu vi volas.

— Vere; mi tiel faros! — diris Saido, — ĉar mi neniam pentis, agante laŭ viaj konsiloj.

Tradukis E. RADVAN RYPINSKI.

(Daŭrigo venos.)



Senvorta amorakonto.

„Tradukita“ de P. Ahlberg.

Rudolfo (pasie): „— ? —.“

Kunigundo (virgine): „? — !! —.“

Ambaŭ (en ravegiĝo): „****!

****!!****!!!“

Malfermiĝas la pordo kaj eniras ŝia patro. — Ekkoleriĝas ekvidante la paron:

„! — ! — ! — — — — !!!!! — — — — —

— !!!!!!!!“



HUMORAĴO.

Peko kaj nefaro.

La instruisto: Nun mi klarigis, kia diferenco estas inter peko kaj nefaro. Diru al mi, kio estus tio, se mi ekzemple transirus kun vi sur ponto, kaj vi epuŝus min en la kavon?

La infano: Estus peko.

La instruisto: Tre ĝuste. Kaj kio estus nefaro?

La infano: Se mi vin ne enpuŝus.

Mallonga kritiko.

— Ĉu vi estis hieraŭ en la teatro? Mia verko estis tie ludata.

— Jes, mi estis tie.

— Nu, kia sceno plej plaĉis al vi?

— La fermo de l' kurteno.

Komuna deziro.

La edzino: Mia patro ĉiam diris, ke li estus preferinta, ke mi estu filo.

La edzo: Nu, tion ĉi mi ankaŭ preferus.

Ĝusta konsilo.

— La ŝafo, kiun mi hieraŭ aĉetis de vi, mortis en la nokto. Nun diru al mi vi mem: kion mi devas fari?

— Ion tre simplan: enterigu ĝin.

Aforismo.

Ne laŭdu ies kvietecon ĝis vi vidos lin metantan cigaron en sian buŝon per ĝia brulanta fino.

Eltiritaj el la „Libro de l' Humoraĵo“.



INFORMEJO DE ESPERANTISTOJ.

Al niaj legantoj. Ĉar ĉiuj promesintoj ne enŝendis ankoraŭ la abonajn monojn, tial ni prokrastas la kvitancon de l' abonpagoj por la venonta numero de nia gazeto.

La adreso de s-ro Aug. Th. Laurén estas de nun Jyväskylä, Finnlando.



Rebusoj.

De Paul de Lengyel.

I.

Ruz	a a a a a a	ulo ulo
	a a a a a a	ulo ulo
	a a a a a a	ulo ulo
	a a a a a a	ulo ulo

II.

Lia	a	D	a	JO
flu				

III.

12. 15. 4. 11. 13. Koloro.
 4. 10. 1. 16. 9. 10. 3. 6. Malvarma, kuirita nutraĵo
 por homoj.
 5. 2. 8. 13. 4. 11. 6. Acida fluidaĵo.
 14. 10. 3. 9. Ronda nombro.
 1. 7. 4. 12. 6. Hejtilo kaj industriilo.
 11. 16. 8. 6. Akvobesto malbela.
 5. 10. 8. 9. 6. Movado de l' aero.

1. 10. 9. 10. 11. 6. Io skribita, konsistanta el:
 5. 6. 11. 9. 6-j, kiuj konsistas el: 1. 7. 9. 10. 11. 6-j.
 1—16. Io amata de ĉiu esperantisto.

.....

La solvojn de tiuj ĉi rebusoj ni presos en la aprila numero. — Ni petas tiujn inter la legantoj, kiuj sin interesas pri tio, ke ili alsendu la solvojn al la **administrado** de nia gazeto. La nomojn de la solvintoj ni presos kune kun la solvoj mem.

A N O N C O J .



NASKITA:
ESPERANTISTINO MALGRANDA

Jyväs kylä, la 24-an de Febr. 1900

Signe kaj Aug. Th. Laurén.

Ĉe la **KLUBO ESPERANTISTA** en **UPSALA** estas aĉeteblaj:

Jarlibro Esperantista 1897, eldonita de la Societo „Espero“ en S. Peterburgo. Kostas 1 frankon.

Libro de l' Humoraĵo de Paŭlo de Lengyel. Tre rekomendinda verko, precipe uzebla kiel ekzerca lego de komencantoj. Kosto 3 fr.

Esperantistoj!

Disvastigante la konadon pri Esperanto oni akcelas la tutan aferon Esperantan. Unu maniero estas uzi ĉiam propagandajn kovertojn. Tiaj en sveda lingvo estas riceveblaj en Svedujo ĉe la Klubo Esperantista Upsala, — en Finnlando ĉe s-ro Aug. Th. Laurén en Jyväs kylä, kaj kostas nur kr. 1 (Fmk. 1:40 p.) po 100, al kio sin almetas la poŝtopago.

Restantaj jarkolektoj de „Lingvo Internacia“ 1899 (malgranda nombro) estas riceveblaj ĉe mi. Kosto: svedaj kronoj 1.50 = frankoj 2.—

Hjalm. Bäckström
 Örnsköldsvik (Suede).

Finlandaj Esperantistoj, kiuj intencas akiri amatorajn fotografiajn aparatojn, estas petataj observi, ke tiaj, kune kun necesaj ĥemiaĵoj kaj uziloj, estas akireblaj ĉe ni je moderaj prezoj, krom kio al esperantistoj estas permesata rabato da 5%. — Postulu kostotabelojn!

Jyväs kylän Rohdoskauppa
 en JYVÄSKYLÄ.

===== PRESEJO ESPERANTISTA. =====

PAUL DE LENGYEL, SZEGZÁRD (HUNGARUJO). — ENTREPRENAS LA FARADON DE ĈIUSPECAJ PRESAĴOJ.

BONA LABORO. MODERAJ PREZOJ.

El la presejo de Paul de Lengyel en Szegzárd.